

TEA-BULTENO

17^A JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2014

NUMEROJ 9-10

Politiko estas arto serĉi problemojn, ilin trovi, ilin misinterpreti kaj poste aplikaĉi maltaŭgajn rimedojn.
Groucho Marx, usona aktoro kaj verkisto (1890-1977)

Karaj Gelegantoj

Preskaŭ finiĝanta estas la somera periodo, kvankam restas certe ankoraŭ ĝueblaj tagoj en septembro, se vetero estos kompleza al ni. Plej ofte septembro estas la plej agrabla monato de ĉi sezono. Fakte troa varmo ne plu turmentas onin kaj tiam plezuriga estas la plonĝado en la maron, kies akvo estas aparte klara kaj plaĉe varmeta kaj, se oni male preferas la montaron, ĵen estas nun la ĝusta momento por plezurodonaj promenadoj en la arbaroj por pluki fungojn aŭ sur la montoj laŭirante panoramajn padojn.

Sed ne forgesu, ke Triesta Esperanto-Asocio malfermos sian pordon **vendrede la 5^{an} de septembro, ekde la 19h30** kaj jam tiam vizitos nin nia asocio Folkmar Koller el Vieno. Mi esperas, ke vi venos multnombraj, ne nur por babiladi kun la gasto, sed ankaŭ por rakonti al ĉiuj pri viaj someraj aventuroj en Esperantujo. Kiel ĉiujare, estis pluraj ebloj pasigi kelkan tempon en la varma Esperanto-etoso: ekzemple, en Kanado, por la Nord-Amerika Somera Kursaro aŭ en Argentino, por la 99^a UK; tute apude al ni, en Rijeka, Kroatio, por la Eŭropa Esperanto-Kongreso aŭ en *Fai della Paganella*, por la Itala E-Kongreso; en Afriko, por la Benina Kongreso aŭ en Azio, Xian por la Orienta E-Seminario ktp. Vere ne mankis okazoj tra la tuta mondo. Espereble vi profitis je almenaŭ unu el tiuj nenombreblaj ebloj!

Nun ekas nia surloka, alekstere direktata, aktivado, krom la kutimaj programoj en la TEA-sidejo. Pli grava ol ĉio ajn tamen estas la "Prezento de Esperanto kaj unua leciono de la baza kurso" kio okazos mardon la 7^{an} de oktobro, je la 17h30 - bonvolu kiel eble plej multe diskonigi tion ĉi, inter amikoj, konatoj, nekonatoj ktp! Plie, se vi havas ideojn, sugestojn, konsilojn por estontaj agadoj, ni pretas vin aŭskulti kaj precipe kunlabori por realigi viajn/niajn planojn por antaŭenigo de la internacia lingvo Esperanto.

Do, ĝis la revido baldaŭ!

Via Elda

Projekto "Koni Trieston"

Crafoliumante libron

pri historiaj rememoroj

KUGLO-MEMORAĴOJ

La jaro 1813^a estis tre malfacila jaro por Triesto.

Ankoraŭa napoleona batalo flamis la monteton Sankta-Justo aŭtune de tiu jaro: okcent francaj militistoj enfermiĝis en la kastelo, sieĝataj de aŭstria armeo desuprinta de la altebenaĵo al la urbo kaj impete bombarditaj de la maro far la brita marŝiparo.

El tiu elŝipa pafado, peze kontraŭstarita de la franca artilerio de la kastelo, restas ankoraŭ hodiaŭ bone videblaj spuroj, lasitaj de la kuglegoj sur urbaj konstruaĵoj. Sed sur kiuj?

- Sur la fasado de teatro *Giuseppe Verdi*, estas 5 kugloj 32-funtaj.
- Sur la fasado de la Katedralo



Sankta Justo du kugloj 32-funtaj.

- Sur la fasado de la domo en strato *Chiadino* n. 5 troviĝas kuglo 48-funta.

- Sur la fasado de la domo en strato *Commerciale* angule kun *Scala Lauri*, alia kuglo 48-funta.

Kaj fine, en iu subtegmentejo en strato *Roma* n. 20, ekzistas iu memorŝtono atestanta iun surlokan batalon.

KIO ESTAS "JAZERA"?

Ankaŭ multaj triestanoj, kvankam ili ja scias la signifon de la vorto, neniam vidis la karstajn glaciputojn, malgraŭ ke iam (ne tiom malproksime en la tempo!) *jazera* tre intense funkciadis, provizante la urbon per "jazero" (= glacio). Kiam ankoraŭ ne ekzistis la artefarita glacio, la bezonitaĵo venis el la Karsta teritorio. Ekde la plej foraj tempoj

oni konstruadis artefaritajn lagetojn (da tiuj ja ekzistis ankaŭ tute naturaj) apud kiuj oni elfosis profundan truon, kvazaŭan puton, foje ĝis 10 metroj. La interna parto estis formita el kalkaj blokoj kunmetitaj per iom da mortero, dum la kovraĵo estis el trunkaj tabuloj kaj folioj miksitaj kun pajo. Tre ofte apud tiu deponejo oni plantis poplojn, por ekspluati ilian ombron dum la somero, kaj fakte ĝuste danke al tio eblas pli facile trovi la spurojn de tiuj iamaj glaciujoj.

Kiam vintre la lageto estis glaciĝinta, oni fortranĉadis la kruston en regulaj blokoj, kiujn oni metis en la apude konstruitan puton: la konstanta temperaturo de la subtero ebligis ke la glacio bone kaj longatempe konserviĝu. En la someraj monatoj la glaciaĵojn oni deprenis kaj transportis al la urbo per ĉaroj tirataj de bovoj. Temis pri tre laciga laboro, sed - laŭ ĉies opinio - la kamparanoj ricevis sufiĉe da mono kontraŭ tio. La privilegiitaj klientoj estis la malsanulejoj kaj la bierfabriko Dreher.

La karstaj glaciuj aktivis ĝis la 1930^{aj} jaroj, ĉar la surmerkato de la unuaj fridujoj ĉesigis tiun servon.

LA EKSTRAVAGANCA JOYCE

En 1905 alvenas en Triesto el la fora Dublino iu senmona irlanda profesoro, kies nomo estis James Joyce (1882-1941). Li venis kune kun knabino, Nora Barnacle, kiun ĉiam li prezentis kiel sian edzinon, kvankam nur en 1931 li ŝin edzinigos, post 27 jaroj da kunvivado. Ilia unua hejmo estis en *Barriera Vecchia*, n. 32: dum sia restado en Triesto mult-foje ili ŝanĝos loĝejon.

Tamen tutcerte tiu unua tago en la urbo restis bone fiksita en ilia memoro. Ĝus eltrajniĝintaj, en la ĝardeneto de la placo vidalvida al la centra stacidomo, ili spektis vigran disputon inter anglaj kaj

aŭstraj maristoj. J. Joyce, kiu estis alta, maldika kaj tre miopa, ekhavis la bizaran ideon helpi la samlandanojn kaj ... sin ĵetis en la lukton.

Konsekvenco? Li pasigis la tutan nokton en malliberejo, dum la pacienca Nora, sidanta sur ĝardeneta benko, atendis lian revenon!

EVANGELIA OKULO

La preĝejo dediĉita al Beata Virgulino de l' Rozario, situanta en la malnova urboparto, havas iom turmentitan historion. Ĝi estis konstruita inter la jaroj 1631 kaj 1635, benita kaj malfermita al la kulto de episkopo Pompeo Coronini kaj konsekrita en 1651 de episkopo Antonio Marenzi. Sekve de subpremaj leĝoj de imperiestro Jozefo la 2^a, ĝi estis fermita en 1784 kaj la postan jaron vendita al la Evangelia Komunumo je Aŭgustena konfesio, kiu eĉ ŝanĝis la preĝ-

egan titolon al Sanktega Triunuo. En 1869 la triesta Komunumo ĝin reaĉetis, post la malkonstruo de la komunuma kapelo - la Preĝejo Sankta-Petro - tiam troviĝanta en placo Granda (nun placo Unuiĝo de Italio). En 1871 ĝi estis ree malfermita al la katolika kulto de episkopo Bartolomeo Legat. En la preĝejo, post la dua Mondmilito, oni starigis altaron memore kaj honore de la Disperdiĝintoj dum ĉiuj militoj.

Kuriozaĵo: el la tempo kiam la preĝejo estis propraĵo de la Evangelianoj restis sur la fasado, super la ĉefpordego, la simbolo de la Triunuo, t.e. okulo



UTOPIAJ TERITORIOJ

estas la titolo de serio da ekspozicioj, kiu komencis per la elmontrado de

"LA INSULO KIU NE ESTAS".

Temas pri la rakonto de la eksterordinara iniciato de homo kiu en la 1960^{aj} jaroj revis pri libero kaj klopodis ĝin konkretigi, starigante propran sendependan ŝtaton meze de la Adriatika maro. Mi parolas pri inĝeniero Giorgio Rosa, la realiganto de la 'Libera Teritorio de la Insulo de la Rozoj'. Pri ĝi aperis ankaŭ artikolo en la TEA-Bulteno - sept-okt. 2009, krome en interreto oni povas trovi plurajn tiurilatajn artikolojn kaj eĉ spekti filmon pri la tuta historio, en Esperanto. Mi konsilas informiĝi per la jena paĝaro:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_de_la_Rozoj

La 26^{an} de julio ĉi-jare okazis en Berceto, urbeto apud Parma, Italio, la inaŭguro de la granda ekspozicio pri "La insulo kiu ne estas". La iniciatinto estis d-ro Giuseppe Bigliardi, la direktoro de la Muzeo *Pier Maria Rossi*, kiu tre lerte kaj kompetente prezentis la tutan historion, kun abundo da detaloj kaj aŭtentikaj dokumentoj. Tiu ekspozicio daŭros ĝis la 28^a de septembro. Ĝiaokaze estis eldonita riĉenhava kaj belaspekta katalogo el 130 paĝoj en du lingvoj, la itala kaj esperanta.

En la inaŭgura tago funkciis poŝta giĉeto, kie oni povis ricevi la oficialan, unutagan, stampon sur poŝtkartoj, eldonitaj porokaze, sur kiuj aperas fotoj pri la platformo, kaj eĉ ties eksplodigo. Krome



estis eldonitaj de la slovena poŝto du diversaj memorigaj poŝtmarkoj, sur kiuj legeblas la koordinatoj de la situo de la Insulo de la Rozoj.


La ekspozicio prezentas historiajn bildojn (fotojn, dokumentojn ...) laŭ specifa itinero ekde la projekto ĝis la realigado de la artefarita insulo, ĉiujn artikolojn aperintajn sur italaj kaj eksterlandaj ĵurnaloj en la 1960^{aj} jaroj kaj ankaŭ la bildstria libron pri Martin Mystere, rilatan al la Insulo.

Okazis interesaj prelegoj kiel "Fantasta aventuro - Reala aventuro", pri la mikronacioj, kaj pri la historio de la oficiala lingvo de la Insulo: Esperanto, fare de prof. Davide Astori, Universitato de Parma. Oni povis spekti filmon pri la marfundo kie troviĝas la platformaj ruinoj kaj alian pri: "Insulo de la Rozoj - Libero timigas". La publiko havis eblon konatiĝi kun la internacia lingvo ankaŭ el gramatika vidpunkto danke al Vittorio kaj Luisa Madella, kiuj zorgis pri rapida kurso.

Estis ankaŭ interesaj, rektaj atestoj de personoj kiuj en tiuj jaroj partoprenis en la konstruado de la platformo aŭ iel sekvis la disvolviĝon de la tuta okazintaĵo.

Dum tuta monato sinsekvigis intervenoj kaj debatoj, tuŝantaj la plej diversajn temojn, ekde tiu filozofia kaj sociologia ĉirkaŭ la koncepto de utopio kaj libero ĝis tiu lingva, kiuj povus esti la startpunktoj por rezonado pli profunda rilate al kialoj kiuj gvidas la homon postkuri la absolutan liberon.

Kaj ĝuste nuntempe, en la aktuala mondo, en kiu moralaj valoroj neniun plu inspiras, libero eĉ ne plu ekzistas, samgrade ĉu fizika ĉu spirita, kvankam malprave ni deklaras - kaj estas plene konvinkitaj pri tio - nin tute liberaj, idealoj kaj utopioj kuŝas jam de longe subtere, ĝuste nun estas la momento remalkovri tiujn "utopiajn teritoriojn", precipe en nia menso, por trovi la esperon kaj ĉefe la kuraĝon engaĝiĝi por komuna pli bona estonteco.



Ankoraŭ du rakontoj el la slovena libro "Butalci" de Fran Miličinski, tradukitaj de Janez Zadavec. Ni vidu kiel ĉifoje butalanoj klopodas solvi siajn problemojn.

KIEL LA BUTALANOJ PREĜEJON PLIGRANDIGIS

Okazis dimanĉe dum la diservo. Malantaŭ la preĝejo en la ombro

sidis plej kapablaj viroj kaj diskutadis saĝe.

Okazis, ke al unu inter ili formikoj eniris la pantalonon kaj li diris: «io mordas mian dekstran gambon, ĉu povas esti la konscio – ĉar oni diras ke la konscio mordas - ĉar ekstere babilante anstataŭ interne partopreni la diservon, ni certe pekas?»

Respondis la urbestro: «Ekstere ni sidas, ĉar la preĝejo estas tro malgranda. Ni pligrandigu ĝin kaj la konscio ne plu mordos la dekstran gambon de nia najbaro.»

Kapjesis la viroj de Butale kaj ekagis.

Ili havis bonegan sterkon, kies famo larĝe odoris. Ili diris: provo nenion kostas, tial ni bone sterku la ĉirkaŭaĵon de la preĝejo kaj certe ĝi kreskos. Kvincent kvindek kvin ĉarojn da sterko ili alportis ĉirkaŭ la preĝejo kaj ĝis la fenestroj la sterko altiĝis. Pluvvis pluvo, sunis suno, kaj Butalanoj prave laŭdis favoran veteron por kreskado de la preĝejo. Fakte la sterko pro la pluvo, suno kaj vento malaltiĝis, kaj kontraŭe la fenestroj de la preĝejo plialtiĝis! Fiere la Butalanoj komentis: «prave ni laŭdis nian sterkon, jen kiel la preĝejo jam kreskis!»

Tamen profunde pripensante ili konstatis, ke ne sufiĉas nur alteco, necesas ankaŭ plilarĝigi la preĝejon. Se eblas plilarĝigo de la ŝuo ĉe la ŝuisto, sekve eblas ankaŭ plilarĝigo de la preĝejo. Almenaŭ ĝis la ombro malantaŭ la preĝejo, kie ili dimanĉe babilas. Ili ĉiuj deprenis siajn jakojn kaj metis sur la saman lokon kie ili kutime sidas. Urbestro firme decidis, ke ili puŝos la murojn trans la jakoj, kaj tiel viroj ĉiudimanĉe partoprenos la diservon.

Viroj poste eniris la preĝejon kaj sub la ordono de la urbestro forte puŝis la murojn. Pro ilia forteco la ĉemizoj disŝiriĝis, botoj rompiĝis, korpoj ŝvitegis, sed brave ili persistis dum la tuta posttagmezo.

Tamen je vespera krepusko ili volis vidi ĝis kie jam la muroj estas puŝitaj. Okazis intertempe ke ŝtelisto preterpasanta forŝtelis ĉiujn jakojn. Tial la Butalanoj eĉ unu jakon ne plu trovis. Kaj ĝoje ili diris: «Bone ni sukcesis, ĉar la muroj jam kovris niajn jakojn! Nun ni ĉiuj povos esti en preĝejo.»

Kaj fakte, kiam venis dimanĉo, estis sufiĉe da spaco por ĉiuj kiuj volis eniri la preĝejon.

BUTALANOJ SALON ALPORTAS

Ekmankis la salo al Butalanoj, kaj tio estis malagraba ne nur pro kuirado kaj bakado, sed ankaŭ por ilia prudento, ĉar neniam ili sciis, kien iri se iu diris «Salu vin!» Kaj tio ofte okazis.

Cerbumis ili kaj finfine decidis, ke necesas seligi dekdu ĉevalojn kaj alporti salon. Ili antaŭvidis longan vojon kaj tial kunportis kaldronon por almenaŭ ne malsati. Ankaŭ pri pluvombreloj ili cerbumis, ĉar granda estas la mondo kaj certe tre diversan veteron havas ĝi. Tamen diris la urbestro: «ni havas tre larĝajn ĉapelojn kiuj protektos nin kontraŭ pluvo. Do ni bezonas nur unu pluv-

ombrelon kiu protektos niajn ĉapelojn, kaj tial ni kunportos nur unu pluvombrelon.» Sed alia diris: «Pli bone ke ni ne kunportu la ĉapelojn, ĉar la vojo estos same longa ankaŭ sen ĉapeloj. Kaj sekve ankaŭ la pluvombrelon, kiu ofte perdiĝas, ne necesas kunporti.» Kapjesis ĉiuj pro tiuj saĝaj vortoj kaj nudkapaj ili ekrajdis la ĉevalojn.

Rajdis ili trans naŭ montoj kaj naŭ valoj kaj atingis la urbon Salomaro. Estis tie tiom da salo, ke oni eĉ la akvon salis kaj poste tiun akvon maro nomas. Do tie oni ankaŭ vendas la salon. Tial Butalanoj aĉetis ŝarĝojn da salo por dek du ĉevaloj kaj Salomaranoj afable permesis al ili reveni, se ili ankoraŭ ion deziras aĉeti.

Butalanoj kontentaj pro bona negoco decidis eniri la gastejon kaj poste tuj hejmen daŭrigi. Sed ili eraris ĉe la enirpordo, kaj anstataŭ en la gastejon ili eniris razejon, kaj tre afabla razisto tuj razis ilin. Tiel bone ili estis tonditaj kaj razitaj, ke ili ne plu rekonis unu la alian, kaj afable demandis inter si «kiu vi estas kaj kien vi iras?»

Tio tute ne plaĉis al ili. Prenis ili la ĉevalojn kaj zorgmiene daŭrigis la vojon al Butale. Transiris ili kvin montojn kaj kvin valojn kaj ripozon kaj manĝon bezonis. En la ombro ili fajron faris kaj en la kaldrono polenton kuiris. Sed polenton oni devas sali kaj tial ili salon petis ĉe proksimaj domoj. Sed neniu havis aŭ ne volis doni ĝin, kaj ili malkontentaj manĝis nesalitan polenton kaj tuj daŭrigis la vojon.

Ekrajdante ili rimarkis ŝarĝojn kun salo sur ĉevaloj kaj kontentaj rapidis al Butale. Sed ju pli proksimaj al hejmo, des pli granda zorgo turmentis ilin. Ĉu ili estas ĝustaj aŭ ne? Ĉar antaŭ la razado ili certe estis ĝustaj, sed tuj poste ĉiuj ŝanĝiĝis.

Malfrue vespere ili revenis al Butale kaj haltis en la placo. Ĉiu al sia domo iris kaj humile pordon frapante demandis, ĉu la dommastro estas hejme. Kaj ĉie ili ricevis respondon, ke la dommastro ne estas hejme, ĉar foriris por salon alporti. Kaj ĝoje ili ĉiuj diris: «danke al Dio, ĝustaj ni estas! Se la dommastro nun estus hejme, kompatinda mi ne sciis kiu mi estas nek kien mi iru.»

Vilaĝanoj ĝojis kaj demandadis ilin pri la urbo Salomaro, ĉu ĝi pli granda ol Butale. Kaj tuj respondis la Butalanoj, ke certe ne, ĉar eĉ la latbariloj por ĉevalojn ligi en la urbo Salomaro mankas.

81^a Itala Kongreso de Esperanto en Fai della Paganella (TN)

La 23^{an} de aŭgusto 2014 ĉiuj korespondiĝoj, donitaj al la poŝta giĉeto deĵoranta en la kongresejo, surhavis la oficialan stampon. Por la okazo estis ankaŭ eldonitaj du diversaj poŝtkartoj, kun belaj bildoj pri la kongresa urbeto.



PLIOFTAJ PARONIMOJ

Kuraĝe! La fino de tia longa vortoparado alproksimiĝas

Stelo	(As) memlumanta astro		oni movas sur tabulo
Ŝtelo	forpreno, rabo	Ŝargi	meti pafaĵon en pafilon
Stelario	(Bo) g. (<i>Stellaria</i>) de herboj el kariofilacoj		(Te) provizi aparaton per necesa peco
Steleo	(Be) sepulta ŝtonmemoraĵo		(Te) enkonduki kvanton da elektro en aparaton
	(Bo) interna parto de radiko, tigo		(Te) en informatiko, provizi dateningon per valoro
Stigmo	(Bo) supra parto de pistilo		(Te) surmeti pezaĵon portotan
	(Zo) haŭtmalfermaĵo ĉe trakeuloj	Ŝarĝi	(Te) plenigi ĝis plena kapacito
	(Md) mikroskopa orifiko en ĉeloj		(f) trudi al iu ion penigan
	(Md) rompopunkto de ovaria foliklo-	Ŝero	(Ge) rifa marborda insuleto
Stigmato	(Md) neforviŝebla haŭtmarko lasita de vundo	Ŝereo	(Ga) hispana sukcenkolora likvorvino
	(Fz) markoj respondaj al la kvin vundoj de Kristo, ankaŭ surkorpe de mistikuloj	Ŝimo	(Bo) mikroskopa fungeto
	(f) rekonebla marko kiel signo de malsano, difekto	Ŝlimo	(Ge) akvomoligita tero, koto
			(Md) substanco el kuracfontoj uzata por kuracaj banoj
Stipo	(Bo) fungtrunketo subportantan la ĉapelon	Ŝoso	(Bo) elkreskanta tigo
	(Bo) g. (<i>Stipa</i>) de herboj el poacoj	Ŝoseo	(Te) larĝa veturilvojo
Ŝtipo	(Te) ligna bloko; segita branĉo	Ŝultro	(Md) parto de homa korpo
	(f) stulta homo		(Te) elstara parto de objekto
Stopi	(Te) haltigi (pp maŝino)	Ŝutro	(Do) fiksa aŭ movebla lignofermilo de fenestro; = Ĵaluzio
	(In) apartigi frazojn en telegramoj	Tabelo	(Fz) gravurplato el ŝtono, argilo ks por grifeli tekston
Ŝtopi	(Te) fermi truon; obstrukci		(Fz) ligna tabuleto pervakse kovrita por kojnoskribo
	(Te) tute plenigi		(In) metoda ordigo laŭ listo sur paperfolio
Stratumo	(Ge) sedimenta tavolo		(In) presita nomlisto
	(Md) sinsekvaj tavoloj de la epidermo	Tablo	(In) datenstrukturo en informatiko
	(Bo) horizontala tavolo de vegetaĵaro		(Do) meblo, uzata kiel apogilo k por surmeti manĝaĵojn
	(Fz) parto de populacio ĉe muestrado	Tabulo	(Do) tia meblo, rigardata kiel aro da manĝantoj
Stratuso	(Me) nubtavolo		(Te) plata, ne tre dika lignopeco
Studo	(In) okupo de lernanto	Taĉo	(Sp) ĉiu flanka linio de la tereno, = tuŝlinio
Ŝtudo	(Te) Stifiteto uzata por kunigi du pecojn el maŝino, ĉarpentaĵo ks	Taso	(Do) malalta, larĝa trinkvazeto
Stupo	(Mr) kanabaj fadenoj por ŝtopi boatojn		(Do) ties enhavo
Ŝtupo	(Te) ĉiu el platoj aŭ tabuloj envicigitaj por ebligi suprenpaŝon		(Te) ujo por pesotaĵo en pesilo
	(Te) ĉiu el analogaj rimedoj uzataj por supren aŭ malsupren iri	Takso	(Fi) vendoprezo oficiale fiksita
	(f) ĉiu el la gradoj en promocio		(Fi) depago ŝuldata de uzanto de publika servo
	(Te) ero de kaskada cirkvito	Taksio	(Te) luebla aŭtomobilo provizita de taksimetro
	(Te) konsumiĝonta raketparto	Taksiso	(Md) manovroj por redukto de hernio ks, sen operacio
Stupao	(Fz) kelketaĝa turo ĉe budhismo	Taksuso	(Bo) g. (<i>Taxus</i>) de pingloarboj el taksusacoj
Suno	(As) centra astro de nia planedara sistemo	Takto	(Be) ritma pulso en mezuro (pp muziko)
Sunao	(Fz) ĉe Islamo, tuto de la solvoj donitaj de Mahometo, poste kolektitaj kiel kompletigo de la Korano		(Te) regula intermita bruo
Supo	(Ga) likva manĝaĵo		(In) signalo per impulsoj en cifereca cirkvito
Supeo	(Ga) delikata aŭ festa vespermanĝo		(f) kapablo sagace juĝi k sin teni
Suro	(Md) tibia muskolo	Taktiko	(Am) arto aranĝi armeojn sur batal-kampo
Surao	(Fz) ĉe Islamo, profetaj mesaĝoj de Mahometo		maniero por atingi celon
Suvereno	(Ju) regnestro		
	(Fi) iama brita ormonero		
Suzereno	(Fz) feŭda senjoro		
Ŝaho	titolo de reĝo de Persujo		
Ŝako	ludo, devenanta el Hindio kaj konsistanta el 32 diverspecaj figuretoj, kiujn		

Amiko ne estas kiu forviŝas viajn larmojn, sed kiu malebligas vian larmadon.

Anonymous

Septembra Programo


5-a, vendredo	19h30 - Unua, postferiada, renkontiĝo en TEA-sidejo. Estas atendita gasto: S-ro Folkmar Koller el Aŭstrio.
9-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
12-a, vendredo	20h00 - 'Dante Poliglotta' - el la paĝaro de Giuliano Turone
14-a, dimanĉo	12h00 - Festo de Amikeco sur Monto Forno. Petu informojn pri kunirado!
16-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
19-a, vendredo	20h00 - El Esperanta gazetaro
23-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
26-a, vendredo	20h00 - Esperanto kaj Interreto
30-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso

Oktobra Programo

4-a, vendr.	20h00 - Filmo pri Mazara del Vallo, kie okazis la 79 ^a Itala E-Kongreso en 2012 - prezentas Edvige
7-a, mardo	17h30 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj; daŭrigo de duagrada kurso.
10-a, vendr.	20h00 - El Esperanta gazetaro
14-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto
17-a, vendr.	20h00 - Fotoj el Kartvelio - prezento de Elda
22-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto
25-a, vendr.	20h00 - Esperanto kaj Interreto
29-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto

Solve de la kvizo de Viglo

La du partoj de la kubeto estis kunmetitaj kaj, do, disigeblaj. Kiel montras la suba, dekstra bildo, la du partoj estis frezitaj: tiu supera (tenono) enŝoviĝas en la foldon de la suba parto, tiel estigante la kubeton.



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349



Verdaj buletoj kun tomatoj

Jen tre bongusta recepto por vekti la apetiton eĉ al pli trodorlotitaj infanoj aŭ plenkreskuloj, kiu simplas, malmulton elspezigas kaj ne postulas tro da laboro. Elprovu ĝin: mi certas pri la tre bongusta rezulto kaj granda sukceso!

Ingrediencoj por 4 personoj:

500 g da spinacoj
 300 g da terpomoj
 100 g da antaŭ-taga pano el tritika faruno
 80 g da faruno
 2,5 dl da lakto
 2 ovoj
 1/2 cepo
 300 g da maturaj tomatoj
 40 g da ŝafa freŝa fromaĝo
 3 kuleroj da olivoleo
 1 branĉeto da bazilio
 salo kaj pipro



Preparado:

1. Boligu la terpomojn dum ĉirkaŭ 40 minutoj, ilin senŝeligu kaj elpremu. Purigu kaj lavu la spinacojn, boligu ilin en la nura akvo restinta el lavado, kaj fine bone post ilia dispredado per la manoj, ilin haketu. Metu en bovleton la panon, surverŝu la lakton kaj lasu ĝin trempi dum 15 minutoj.
2. Kunmetu en pli grandan bovlon la terpomojn, la spinacojn, la panon dispreditan kaj diserigitan, la farunon, la du ovojn kaj pinĉeton da salo kaj pipro. La tuton kunmiksi zorgeme.
3. Senŝeligu la tomatojn, duonigu kaj sensemigu ilin, forpremu la akvon kaj dispecetigu ilin. Haketu la cepon, ĝin fritetu en la olivoleo: tiam aldonu la tomatojn, la baziliajn foliojn, salon k.b. kaj kuiretu dek minutojn.
4. Boligu en poto abundan salitan akvon. Prenu etajn kvantojn de la miskaĵo, kaj permane formu plurajn buletojn grandajn kiel juglandojn. Ĵetu ilin en la bolantan akvon kaj ilin kuiru dum du-tri minutoj aŭ ĝis kiam la buletoj surface flosas, elprenu ilin per trukuler-ego kaj kondimentu per la tomata saŭco.



Servu ilin en teleroj post raspado de la ŝafa fromaĝo. Bonan apetiton!

Eŭropano en Afriko aĉetas kamelon de arabo.

"Kiamaniere oni funkciigas la trafikilon?" demandas la aĉetanto. "Tre facile, sinjoro. Eksidu sur la kamelon kaj diru "uf". La kamelo ekiros. Diru "uf-uf", la kamelo kuros. Diru "sufiĉe!" kaj la kamelo haltos." La eŭropano eksidas sur la kamelon kaj diras "uf". La kamelo iras. "Uf-uf," diras la viro, kaj la kamelo kuras. Subite antaŭ ili aperas abismo. "Sufiĉe!" ekkrias la viro, kaj la kamelo haltas sur la rando de la abismo. La rajdanto elpoŝigas poŝtukon, viŝas sian ŝvitintan frunton kaj elspiras: "Uf!"

El **lernu.net** <http://it.lernu.net/biblioteko/anekdotoj.php>